



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Hamburgo

atendas vin!

Ĉu vi jam
aliĝis al la
59a UK 1974?

Eldononto/Herausgeber:

Ludwig Pichel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 16/1974 7 majo 1974
Aperas ĉiusemajne

Willy Brandt demisiis

Bonn (pp) En letero al la federacia prezidento, Gustav Heine-
mann, federacia kanceliero Willy Brandt deklaris sian demision
la 6an de majo 1974. En la letero Willy Brandt skribas: "Mi
transprenas la politikan respondecon por la malzorgecoj lige
kun la agenta afero Guillaume kaj deklaras mian ekziĝon el la
funkcio de federacia kanceliero..."

Ĝis la elekto de nova kanceliero la 16-an de majo 1974, supozeble
la ĝisnuna financministro Helmut Schmidt, Walter Scheel komisie
gvidas la registarajn aferojn.

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio jam la 7-an de majo informis
pri la demisio de Brandt en siaj elsendoj je la 16,30 h kaj
22,30 h. Oni limigis sin al la fakta raportado kaj ne donis iun
komenton. Kiel kaŭzon de la demisio oni citis "la aferon Guillaume".

Kiel konate Guillaume, kiu estis persona referento de la kance-
liero, estis arestita antaŭ kelkaj tagoj sur la suspekto de spio-
nado en la servo de la sekretservo de Germana Demokratia Respu-
bliko.

Multaj homoj, en FRG kaj en la eksterlando, bedaŭris la paŝon de
Willy Brandt, pri kiu Pilo-Press kelkfoje povis informi en rilato
kun elpaŝoj de la dama kanceliero pri Esperanto. Ankaŭ Pilo-Press
bedaŭras la demision de Brandt kaj certe ankaŭ multaj esperanti-
stoj.

Akcepto por la prezidanto de UEA

Bonn (pp) Lia Ekcelenco, la aŭstralia ambasadoro en Bonn, Ralph
Harry, akceptos la prezidanton de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna,
la 6-an de junio 1974 en sia rezidejo. Al la akcepto la aŭstra-
lia ambasadoro invitis cent ambasadorojn akredititaj en Bonn,
por doni al la ambasadoroj la okazon informiĝi pri la lasttempa
evoluo de Esperanto kaj pri la planoj por la 59-a Universala Kon-
greso de Esperanto en Hamburgo.

En la invitletero la aŭstralia ambasadoro menciis, ke li parto-
prenis pasintjare en la Universala Esperanto-Kongreso en Beogrado,
kiun li nomis gravan internacian konferencon. Li akcentis, ke la
inaŭguro de la 59-a Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo
fariĝos impona demonstracio pri la vasta geografia disvastigo de
la internacia lingvo kaj pri sia funkciado.

Varsovio trifoje tage

Varsovio (pp) Ni denove atentigas pri la fakto, ke Radio Varsovio
ekde la 6-a de majo 1973 elsendas Esperanto-programojn trifoje
ĉiutage, nome je la 6, 16,30 kaj 22,30 h. Detaloja legu sur alia
loko. La nova elsendo je la 22,30 h estas aŭdebla sur 200 m kaj
49 m, kio garantias sufiĉe bonan aŭdeblecon. Ĉi-tie en Nürnberg
la elsendo estis bone aŭdebla sur meza ondo 200 m.

La enkonduko de tria elsendo sendube estas grava atingajo por
Esperanto en la praktiko.

Memore al Franz Jonas

Vieno (pp) Pilo-Press jam publikigis memorigan artikolon pri nia mortinta samideano Franz Jonas, prezidento de Aŭstrio. Tamen ni volas hodiaŭ publikigi la nekrologon, kiun disaŭdigis la Radio Wien, Mallongonda Servo, la 4-an kaj 5-an de majo 1974 dum la Esperanto-elsendoj.

La nekrologo, verkita de D-ro Leopold Grimme, senatkonsilisto kaj prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, tekstas:

"Kvankam ne plu surprize, tamen plej kortuŝe ni eksciis pri la morto de nia Federacia Prezidento Franz Jonas. Profunde funebras lin, kiel nombro da kondolencoj, alvenintaj telegrafe kaj skribe, pruvas, ne nur la aŭstriaĵ samideanoj, sed la tutmonda esperantistaro.

Jam en junaj jaroj li ellernis la Internacian Lingvon Esperanto, kiun li ekkonis kieltaŭgan, ja necesan ilon, speciale ankaŭ por la interligo kaj unuigo de la batalantoj por socialismaj tendencoj, ĉie en la mondo.

Tial li tre aktive agadis por la "Internacio Socialist-Esperantista" ĉis en la jaro 1934 la venkinta Aŭstro-Faŝismo nuligis ties prosperan evoluon. Sekvis la nedireble barbara Nazi-reĝimo, dum kies daŭro li, kiel ĉiuj liaj kamaradoj kaj amikoj, povis kontakti nur sekrete.

Sed ankaŭ depost 1945, kiam limpli kaj pli okupis politikaj laboroj kaj oficialaj funkcioj, li neniam demetis sian esperantistecan. Kiel urbestro de Vieno, poste kiel Federacia Prezidento, li ĉiam volonte akceptis delegaciojn, eĉ unuopulojn esperantistajn kaj konstante kontaktis letere kun siaj esperantistaj amikoj. En 1962 li protektis kaj elstare partoprenis la 35-an SAT-kongreson en Vieno. Sed kulmino estis lia protektado de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en 1970, kiun li inaŭguris, en Vieno, kun grandioza esperantlingva parolado antaŭ pli ol dumil gesamideanoj kaj gastoj. Neforgesebla sperto por ĉiuj partoprenintoj. Liaj profundaj kaj realismaj pensoj pri la estonteco de Esperanto estas ankoraŭ ofte citataj.

Dece konvenas, do, ke ni re-aŭdigu al niaj geaŭskultantoj almenaŭ kelkajn vortojn el tiu lia, sonbende konservita, por ni ĉiuj tiom memorinda alparolo:...."

La paroladan ekstrakton Pilo-Press fakte jam publikigis en sia pasinta numero.

Zamenhof-memorsoleno en Vieno

Vieno (pp) La Zamenhof-memorkunveno, kiun Pilo-Press siatempe anoncis, fariĝis kvaze la inaŭgur-araĝo de la nova Viena Pola Instituto. La kunveno ĉeestis pli ol cent personoj, inter ili la nestorino de la aŭstria Esperantista Federacio, 93-jara Frieda Feichtinger, ankoraŭ aktiva en la traduka fako, la prezidanto de la Aŭstria-Pola Societo, D-ro Theodor Kanitzer, kaj la estro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, D-ro Walter Hube.

La direktoro de la Pola Instituto, Mag. Mieczyslaw Klos, kiu bonvenigis la gastojn kun sentebla koreco, esprimis sian ĝojon, ke li povas prezenti la novan instituteton je tia deca okazo. Laŭ li la tasko de la Instituto estas fortikigi kaj pluevoluigi la amikecon inter la aŭstria kaj pola nacioj. Al la direktoro dankis D-ro Leopold Grimme, prezidanto de AEF kaj bedaŭris, ke direktoro Ludwig Jonas, la frato de prezidento Franz Jonas, pro la grava malsano de sia frato ne povis ĉeesti. La festparoladon faris D-ro Karl Beckmann pri la ŝancoj de Esperanto. Klasika kaj moderna muziko, prezentata de la ĉarna juna Krystyna Jurkowska kaj de la simpatie serioza Marian Kiciak, enkadrigis

la aranĝon. Interesa kolorfilmo montris ne nur la belaĵojn de la polaj pejzaĝoj kaj urboj, sed malkaŝe ankaŭ iliajn problemojn, antaŭ ĉio la danĝeron de la ankaŭ tie ĉiam kreskanta industria polucio.

Je la fino de la aranĝo Mag. Klos invitis al koktelo, kiu retenis dum ankoraŭ kelka tempo la babilemajn partoprenintojn.

Antaŭ la kunveno, kiu okazis la 20-an de aprilo 1974, estis demetitaj florkronoj piede de la Zamenhof-busto en la proksima Borsa Parko.

Pri Germana Esperanto-Revuo

La eldonanto de Germana Esperanto-Revuo bedaŭras la prokraston en la aperado de la revuo pro jenaj kaŭzoj:

- 1) En februaro la ĝisnuna presejo likvidiĝis kaj ĉesigis ĉiujn presajn laborojn. Estis do necese trovi novan presejon kaj esplori la eblecon pri eventuala aliteknika produktado de la revuo.
- 2) La kostoj por la produktado de la revuo plialtiĝis tiomgrade, ke necesis pripensoj kaj aranĝoj por venki tiujn financajn obstaklojn.

Intertempe n-ro 2/1974 estas presata kaj aperos ĝis meze de majo. La aliaj numeroj sekvos en la antaŭvidita ritmo, tiel ke ĝis fine de junio aperis entute 4 numeroj.

Laŭenhave Germana Esperanto-Revuo volas prezentiĝi kiel "eŭropa Esperanto-revuo". La eldonejo petas kunlaboremajn personojn, speciale ankaŭ sur literatura kaj kultura kampoj, pri sinanco. Skribu al Germana Esperanto-Revuo, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Esperanto en la radio

Varsovio. Post la enkonduko de ĉiutaga tria elsendo ĉiu esperantisto nun havas fakte eblecon, almenaŭ unufoje tage aŭskulti al Esperanto-elsendo, ĉu matene, posttagmeze aŭ vespere. Speciale la vespera elsendo ĝajnas esti oportuna: Kial ne fini la tagon kun Esperanto en radio? Kaj kial ne endormiĝi kun la "Bonan Nokton"-saluto de Barbara Pietrzak? Dufoje nun oni povas aŭdi ĉiutage novaĵbultenon el Varsovio kun aktualaj informoj el Pollando kaj el la mondo, inter la novaĵoj ni trovis ankaŭ tiajn el la Esperantomovado, ekz. pri la simpozio de Esperanto-geologoj nun okazanta en Varsovio. Pri ĉi tiu simpozio cetere estis disaŭdigita sonraporto de Andrzej Pettyn. En la pasinta Esperanto-ekspreso oni povis aŭdi interesan intervjuon kun d-ro I. Szerdahelyi pri la eksperimenta instruado de Esperanto en la zono I, kiu finiĝas ĉi-jare. La eksperimento, en kiu partoprenas ĉ. 900 gelnantoj en 5 landoj, pruvu jenajn hipotezojn: 1) Esperanto estas pli facila ol aliaj lingvoj, la sukcesefienco estas pli alta; 2) Esperanto estas pli vigle aplikebla; 3) Esperanto helpas la lernadon de aliaj lingvoj; 4) Esperanto positive influas la lernadon de la gepatra lingvo. - La aŭskultantoj estas petataj skribi siajn komentojn pri la E-elsendoj, speciale pri la nova tria, al Pola Radio, Esperanto-redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Varsovio 1, Pollando.

Vieno. Post la aktuala komentario de d-ro A. Macher oni aŭdis la nekrologon pri Franz Jonas. La aŭskultebleco fariĝas pli kaj pli bona. Berno. D-ro A. Baur plue parolis pri la Gotthard-tunelo kaj ges-roj Gacond komencis prelegserion pri la persekutoj de Esperanto laŭ la libro de Ulrich Lins "Esperanto - danĝera lingvo."

NOVA KAJ LONGE ATENDATA

Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj

Ci tiu fakvortaro, kiu estas tute unika, kontentigas grandan bezonon. Dank' al ĝi la komerca kaj ekonomika terminologio en Esperanto nun estas normigita, multege plivastigita kaj modernigita. Inda kontribuo al la jam plenkreska Internacia Lingvo!

La vortaro estas la frukto de pli ol naŭjara internacia kunlaborado. Ĝin projektis, kompilis kaj redaktis F. Munniksma (Nederlando) sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI) - Nederlando.

La kunaŭtoroj por siaj respektivaj lingvoj estas:

ANGLA	A. Venture; F. Munniksma
ESPERANTO	F. Munniksma; Prof. G. Waringhien; D-ro A. Albault; C. A. Pruisen
GERMANA	D-ro W. Bormann; D-ro L. Röhl; B. Vogelmann; Dipl. Ing. R. Haferkorn
HISPANA	L. Mimó Espinalt; M. D. Nieuwenhuis
FRANCA	R. Tavernier f; E. L. M. Wensing; J. Thierry; R. Bernard
ITALA	D-ro G. Polerani; Centro por Esperanto en Komercio, Industrio kaj Turismo (C.E.K.I.T.) Milano
NEDERLANDA	F. Munniksma
PORTUGALA	Prof. D-ro C. Domingues
SVEDA	E. Carlén

Enhavo kaj aranĝo

- Ci tiu vortaro enhavas specifan terminologion de organizado kaj tekniko de la komercio, ekonomiko kaj sociala ekonomiko. Granda nombro de la enmetitaj terminoj ne troviĝas en ĝeneralaj, multaj eĉ ne en ĉiuj specialaj vortaroj. Ŝajne simplaj terminoj, kiel pensio, salajro, ferioj, striko k.s., enmetiĝis pro sia social-ekonomika signifo.
- Aldonita estas listo kun la nomoj de ĉirkaŭ 200 landoj kun ties valutoj, same en la diversaj lingvoj.
- La vortaro estas naŭlingva. La anglaj terminoj estas en alfabetita sinsekvo kaj per faciluza sistemo de 8 indeksoj la libro estas alirebla el ĉiu de la aliaj enmetitaj lingvoj.
- Elstara eco de la vortaro estas ke ĝi enhavas la difinon aŭ klarigon en Esperanto kaj la angla de ĉiu termino, tiel ke la verko samtempe estas lernolibro.
- La vortaro kreiĝis tute pere de la Internacia Lingvo. Ekzemple, la difinoj kompiliĝis en Esperanto kaj poste tradukiĝis en la anglan.

formato: 15 x 21,5 cm bindita: 535 paĝoj
prezo: DM 72,50; por membroj de Esperanto-
asocioj DM 65,—
eldonis: Kluwer/Nederlando



Distribuado en Germanio
VERLAG KOMMENTATOR GMBH
6 Frankfurt/M., Postfach 970 148

Novaj eldonaĵoj

Bonvolu atenti la ĉi-apudan anoncon pri la "Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj". La vortaro estas havebla ĉe Ludwig Pickel, libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113 post kelkaj tagoj, kiam la eldonaĵo sendis stokon.

La unuigo de Eŭropo kaj ĝia lingvoproblemo

Ĝis la 20a de majo aperis germanlingvo broŝuro "Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem" de Dr. Werner Bormann (La unuigo de Eŭropo kaj ĝia lingvoproblemo).

Formato DIN A 5, ĉ. 20 paĝoj
Prezo 3,— GM. Por pli grandaj kvantoj rabatita prezo.

Mendojn akceptas jam nun Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg

La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj de H. Sienckiewicz kaj aliaj aŭtoroj polaj.

Elektis kaj tradukis D-ro Kazimierz Bein (KABE)
Fotorepreso Dana Esperanto-Eldonejo, 14 x 19,6 cm, broŝ., 206 p. 12,50 DM

Patroj kaj filoj de I. Turgenjev, el la rusa tradukis D-ro Kazimierz Bein (KABE), 3a represo de Dana Esperanto-Eldonejo, 14x19,6 cm, broŝ., 215 p., 12,50 DM

Nuda inter lupoj, romano de Bruno Apitz en la Esperanto-traduko de D-ro Karl Schulze, Eldonejo Edition Leipzig, GDR 12,5 x 19,5 cm, bind., 480 p. prezo 12,— DM.

Ne plu ludo kaj aliaj noveloj de H. Bartelmes, SAT, Paris, 11x17,2 cm, broŝ., 126 paĝoj, prezo 6,40 DM

Morso-klubo libreto por geknaboj de Robert Fisker en la traduko de Gudrun Riisberg. 14,5 x 20,5 cm, broŝ., 31 paĝoj prezo 2,30 DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg, Postfach 2113, p.k. Nürnberg 819-56